JARLIBRO

1946

DUA PARTO

Enestas:
Leĝa Terminaro

Internacia
Esperanto-Ligo

ANTAŬPAROLO

Ĉi tiu leĝa terminaro, entreprenita laŭ peto de S-ro Cecil C. Goldsmith, Sekretario de I.E.L., nek povas nek celas esti kompleta. Por sukcesi en tio, necesus la laboro de ĉiu Esperantista juristo, kiu legas ĉi tiun verkon. Ĉi tie mi petas ĉiun interesaton alsendi al mi rimarkigojn pri la verko kaj mi danke notos ĉiun kritikon, kiu ebligos al mi plibonigi ĝin per suplemento, aŭ en eventuala dua eldono.

Mi esperas, ke ĝi faciligos internaciajn jurajn rilatojn per Esperanto, kaj samtempe unuecigos tra la mondo la uzadon de la faklingvajo. Uzo de Esperanto povus ebligi internacian kunlaboradon de juristoj, kio estus plej potenca fonto de progreso. Se oni povus legi juristajn gazetojn kaj revuojn redaktitajn en Esperanto, la ĉiulandaj juristoj povus facile sciiĝi pri la laboroj de sia fako en la tuta mondo.

Nescio pri la leĝo ne senkulpigas la homon. Ĉiu homo devus sin okupi pri ekscio pri la leĝo ; aserti la kontraŭon signifus doni premion je nescio, kio garantius defendon al ĉiu ebla rompo de la leĝo. Ĉiu edukita persono, kiu praktikas la privilegiojn kaj plenumas la devojn de ŝtataneco, senpere interesiĝas pri leĝoj. La celo de ĉi tiu terminaro estas doni al la Esperantistaro fundamentan informon pri tiuj vortoj de la leĝa sistemo, kiuj verŝajne tuŝos ilin en ĉiutaga vivo.

Valorajn konsilojn kaj helpon mi ricevis de S-ro B. E. Long kaj ĉi tie mi esprimas al li tutkoran dankon.

Mi enmanigas mian verkon al la Esperantistaro kun la deziro, kiun malnova aŭtoro, nome la verkinto de la Makabeo-libroj de la Malnova Testamento, metis en la fino de sia libro : "Se mi faris tion ĉi plaĉe, tiel mi plezure volis tion. Sed se ĝi estas tro modesta, tiel mi tamen faris ĉion, kion mi povis."

D-ro A. MILDWURF.

Londono, en Julio, 1946.

Abjudiko : Depreno per juĝa decido.

Abrogacio : Nuligo de leĝo.

Adopti : Alpreni, per oficiala laŭleĝa akto, iun kiel sian propran filon aŭ filinon.

Advokato : Persono oficiale rajtigita por defendi en juĝejo la interesojn de procesanto aŭ akuzato.

Agnato : Parenco de patra flanko.

Aĝio : Diferenco inter la nominala kaj efektiva (laŭkurza) valoro de mono.

Aĝioto : Negocoj, kiuj volas nur eluzi la atendatajn prezŝanĝojn.

Akapari : Aĉeti kiel eble plej multajn varojn, kaj poste, per reteno, maloftigi ilin sur la merkato, por vendi ilin pli kare.

Akcizo : Interna (enlanda) konsumimposto.

Akreditivo : Letero per kiu banko aŭ bankiero de unu loko malfermas al iu ĉe sia korespondanto krediton de fiksita sumo.

Akto : Oficiala dokumento, atestanta fakton.

Aktivo : Posedvalorajoj, havajo, pretendoj, bonhavo.

Alibio : Restado sur alia loko en la momento de krimo.

Alimento : Vivtendevo, precipe por ne-legitimaj infanoj kaj senkulpe separitaj edzinoj.

Amend(ament)o : Plibonigprojekto, aldonprojekto al leĝskizo.

Amortizo : Laŭŝtupa pago de ŝuldoj.

Antinomio : Kontraŭeco inter du leĝoj.

Anuito : Jara partopago aŭ rentumo de ŝuldo.

Apelacii : Alvoki pli altan decidon.

Apelacia instanco : Pli alta juĝejo al kiu oni turnas sin.

Arbitraĝo : Borsnegocoj pri kurz- kaj prezdiferencoj de diversaj borsoj.

Asekuro : Certigo al si, per speciala pago, kompenson de perdoj, kiuj povas esti kaŭzitaj de morto, ŝippereo, fajro, k.t.p.

Asesoro : Helpa kunsidanto de juĝisto.

Asizo : Kunsido de kriminala tribunalo.

Aŭkcio : Publika vendo al la plej multe ofertanta.

Banka Ferio : En Anglujo la Pasko- kaj Pentekostolundo, la unua lundo en Aŭgusto, la Kristnaskotago kaj la 26a aŭ 27a de Decembro : en Skotlando aliaj tagoj.
Bankroti : Ĉesi pagi siajn komercajn ŝuldojn kaj lasi deklari oficiale pri tio.
Bigamio : Krimo de viro, kiu edziĝas kiam ankoraŭ vivas lia unua edzino, aŭ de virino, kiu edziniĝas kiam ankoraŭ vivas ŝia unua edzo.
Bilanco : Tabelo de aktivoj kaj pasivoj de komerca firmo.
Bilo : Negocebla komerca valor-papero.
Bimetalismo : Dumetala monsistemo ; monsistemo, kiu baziĝas je certa valor-rilato de oro kaj arĝento, kaj devigas la ŝtaton, je kostoj de privatuloj, stampi monerojn el liverita oro kaj arĝento.
Bojkoto : ago de tiu, kiu rifuzas labori por iu, vendi al iu, aĉeti de iu, pro malsameco de politikaj aŭ sociaj opinioj.
Borso : ejo, kie estas faritaj financaj operacioj, vendado kaj aĉetado de akcioj, obligacioj, k.t.p. kaj notata ilia kurzo.
Civila : kiu estas nek militista, nek pastra.
Civila edziĝo : edziĝo nereligia.
Debeto : ŝuldo, ŝuldoj ; maldekstra flanko de komercaj libroj, sur kiuj oni enskribas la ŝuldojn.
Debitoro : ŝuldanto.
Deficito : tio, kio mankas, por ke la elspezoj ne superu la enspezojn.
Deflacio : redukto de la bankbiletsuperfluo.
Dekreto : decido, ordono de supera ŝtata povo.
Delegi : sendi iun, kiel reprezentanton.
Delikto : puninda ago, malpli grava ol krimo.
Delkredero : garantio prenita sur sin pri solventeco aŭ pagokapableco de iu.
Denaturalizo : forpreno de ĉiu civitana rajto.
Denunci : sciigi juĝiston aŭ aŭtoritatulon pri ies krimo aŭ kulpo.
Deponaĵoj : ĉe iu banko aŭ sekurejo lasitaj monvalorajoj, valorpaperoj, k.t.p.
Detektivo : ano de sekreta polico.
Devalorigo : malpliigo de la nominala valoro de valuto.
Diferenciga tarifo : escept-tarifo ĉe la fervojo, malaltigitaj transport-tarifoj laŭ certaj longaj distancoj, per kiuj unuopaj industrie gravaj regionoj estas favorataj.
Diferenciga limimposto : limimposto, por havigi rimedojn kontraŭ aliaj ŝtatoj sub certaj cirkonstancoj.

Dividendo : parto de neta profito por unu akcio.
Domicilo : loko, kie oni havas siajn ĉefaferojn aŭ okupon kaj kiu estas konsiderata kiel kutima laŭleĝa restadejo.
Doto : havajo, kiun edzino havigas per la edziniĝo al sia edzo, aŭ edzo al sia edzino.
Dumpado : Vendo eksterlande je speciale malaltaj prezoj de varoj, enlande vendataj nur je pli altaj prezoj.
Ekspatriigo : ekzilo, eljeto el la patrolando.
Ekspertizo : esploro farita de spertulo.
Ekspluati : fari uzon de io, havi profiton de io ; uzi por si la fruktojn de ies laboro sen sufiĉa rekompenco ; trouzi.
Ekspropriigo : deviga forigo de la privata proprajo sen aŭ kun kompenso.
Eksterteritoria : ne submetita al la landaj leĝoj ; ekzemple, ambasadoroj en fremda lando, kie ili devas reprezenti sian hejmlandon.
Embargi : malpermesi provizore al ŝipo la elveturon el la haveno aŭ ĝian malŝarĝigon.
Enketo : juĝa aŭ oficiala esploro.
Evikcii : juĝe forigi, perforte forpeli el loĝejo, posedaĵo.
Faksimilo : preciza reprodukto, kopio de skribaĵo.
Faktorio : kontoro de komercaj agentoj en fremda lando.
Fakturo : detala noto pri la kvanto kaj prezo de venditaj komercajoj.
Fisko : Ŝtata kaso.
Garantii : promesi la fariĝon de io sub sia propra respondeco.
Gotenburga sistemo : komunuma limigo de la alkohol-vendado.
Ĝiri : surskribi sur la dorsa flanko de bilo, kambio aŭ ĉeko per kio oni cedas ĝin kaj ĝian valoron al citita persono aŭ al ĝia prezentonto.
Hipoteko : rajto donita al kreditoro pri nemovebla havo, kiel garantiajo de ia ŝuldo.
Honorario : neperioda salajro por iu servo de personoj praktikantaj liberalan profesion.
Impostoj nerektaj : impostoj enkalkulitaj en la podetalaj prezoj de varoj kaj sekve ne rekte pagataj al la ŝtato.
Impostoj rektaj : impostoj pagataj rekte al la ŝtato.
Imuna : ne respondeca antaŭ la leĝo ; ŝirmita per leĝa privilegio.
Inflacio : Superŝuldono de papermono, per kiu estas malsuprenpremata la monvaloro.
Inkvizi : esplori, ekzameni, juĝe aŭskulti.

Instanco : grado de juĝa povo.

Interpelacio : demando, farita en parlamento aŭ juĝejo por ricevi klarigon pri ia ago.

Inventaro : detala etato en kiu estas sinsekve enskribitaj ĉiuj objektoj, varoj, valoroj, apartenantaj al iu persono, societo, firmo.

Investi : uzi kapitalon por profita celo.

Juro : leĝoscienco.

Jura persono : societo de pluraj personoj, per speciala ŝtata rekono rigardata kiel unuopa persono.

Jurio : aro da homoj (ordinaraj civitanoj) kiuj devas aŭskulti procesON kaj anonci verdikton.

Kambio : laŭformula pagordono aŭ pagpromeso de difinita sumo, je vido aŭ je fiksita dato, prezentota ĉe indikita adreso.

Kapitalo : ekonomie, la sumo de havaĵoj por celo de produktado aŭ de akiro.

Kartelo : interkonsento de industriistoj de la sama fako, por gardi siajn interesojn.

Kasacio : leĝa nuligo de decido.

Kaŭcio : monsumo garantianta la plenumon de interkonsento, de kontrakto.

Kliento : persono, kiu konfidas kutime siajn aferojn al aferisto.

Koluzio : sekreta, plej ofte kondamninda, interkonsento.

Kompromiso : reciprokaj cedoj en la opinioj por interkonsenti kun la kontraŭulo.

Koncesio : rajtigo, permeso, donata de la registaro.

Konfiski : forpreni, kiel punon, por la ŝtato ; forpreno de objekto malpermesita, pro nekonformo al la reguloj (ekz. ĉe dogano).

Konsorciaj negocoj : komune de pluraj bankoj entreprenitaj gigantnegocoj, ekz. ŝtatpruntoj.

Konstitucio : ŝtata sistemo de lando.

Konsulo : reprezentanto de lando ĉe fremda registaro.

Kontrabando : sekreta importado de malpermesitaj objektoj, aŭ de komercajoj, por kiuj oni devus pagi limimposton.

Kopirajto : eldon- kaj aŭtorrajto.

Koopto : alelekto de la ĝisnunaj membroj de pluraj pluaj membroj en societo, komitato, k.t.p.

Korporacio : societo de samprofesianoj, posedanta la rajtojn de leĝa persono.

Korupto : akiro de ies favoro en kontraŭleĝa afero, per mono aŭ donaco.

Kreditoro : tiu al kiu oni ŝuldas sumon.

Kriminala : koncernanta la juron pri la krimoj.

Kupono : dokumento ĉe akcioj aŭ obligacioj, post prezento de kiu oni ricevas la procenton.

Kurtaĝo : pago al makleristo.

Kvitanco : skribaĵo per kiu oni kvitigas iun pri sumo, kiun li devis pagi ; kvitatesto.

Kvorumo : decidkapabla nombro.

Kvoto : proporcia parto de tuto, kiun oni devas doni, pagi, aŭ kiun oni rajtas preni, ricevi.

Legitima : leĝa, laŭleĝa.

Legitimilo : pruvaĵo de la identeco de persono, de la aŭtentikeco de dokumento.

Licenco : Estrara permeso ; permeso ; permesatesto ; privilegio.

Likvidi : definitive forigi, solvi, finreguligi.

Lokaŭto : interkonsento de labordonantoj fermi la entreprenojn, por per tio devigi la laboristojn al cedo.

Lombardi : monprunti kontraŭ movebla garantiajo.

Majorato : heredaĵo, kiun ricevas la plej aĝa de la familio.

Mandato : dokumento, per kiu iu rajtigas alian personon agi en lia nomo ; dokumento, ordonanta pagi iun sumon da mono al difinita persono.

Marĉandi : diskuti pri la prezo de io por aĉeti ĝin pli malkare.

Merkato : sfero de vendo, kampo de komerca agado pri aparta branĉo.

Monopolo : privilegio donanta al iu persono, kompanio aŭ ŝtato ekskluzivan rajton fabriki aŭ vendi ian komercajon aŭ plenumi ian servon.

Moratorio : konsento je prokrasto en ŝuldrepagoj.

Naturalizo : dono de plena civitana rajto al fremdlandano.

Nepotismo : tro-uzo de ies povo, por doni oficojn al siaj samfamilianoj, k.t.p.

Notario : oficiala oficisto, kies funkcioj estas iom diversaj laŭ la landoj, sed kiu ĝenerale estas leĝe rajtigita por redakti, atesti, konservi kontraktojn kaj aktojn k.s.

Obligacio : kredita papero, donata de ŝtato aŭ privata kompanio, kiel dokumento pri ŝuldo.

Patento : dokumento por ekskluziva rajto ekspluati eltrovon.

Peticio : Petskribo : ekz. petskribo direktata al parlamento aŭ al reĝo, k.c.
Pledo : defendo antaŭ tribunalo.
Prerogativo : ekskluziva privilegio.
Preteksto : ŝajna motivo eldirita por kaŝi la efektivan.
Pretendi : postuli ion, pri kio oni asertas, ke oni havas rajton super ĝi.
Primogenituro : unue-naskiteco ; la privilegio de la unuenaskito ĉe la tronheredo, k.c.
Privilegio : aparta rajto aŭ favoro, koncesiita al iu ekster la komuna rajto.
Probabla : karakterizas ion, por kies vereco ekzistas pli da motivoj ol kontraŭ.
Proceduro : procedaro en juĝaferoj.
Proceso : juĝafero jure submetita al tribunalo.
Prohibicio : ordono malpermesanta ian agadon ; leĝa malpermeso vendi kaj produkti alkoholaĵojn.
Prokuro : laŭleĝa povo aŭ rajtigo donita de iu firmo aŭ persono al alia por agi en ĝia nomo.
Prokuroro : supera juĝa oficisto, akuzanta en la nomo de la ŝtato.
Protokolo : oficiala raporto, per kiu rajtigita aŭ kompetenta persono konstatas, kion li faris, vidis, aŭskultis.
Provizora : konsiderata kiel ne longe daŭronta, sed anstataŭota per definitiva.
Rabato : malpliigo de prezo, konsentita al aĉetanto.
Ratifiko : definitiva aprobo de kontrakto.
Referendumo : popolbaloto pri registara projekto.
Regento : anstataŭanto de reĝo.
Rekvizicio : ordono de iu publika aŭtoritato, ke oni disponigu al ĝi personojn aŭ aĵojn por ia publika servo.
Rento : jara profito pro pruntedonita mono, valorpaperoj k.c.
Reskripto : dekreto, ordono.
saboti : intence fuŝi.
Saldo : diferenco inter debeto kaj kredito.
Sankcio : puno aŭ rekompenco sekvanta ian moralan aŭ socian agon.
Sekestri : depone konfidi disputatan proprajon al krompersono, kiu devas gardi ĝin ĝis definitiva juĝa decido.
Separo : laŭleĝa (tempa aŭ dumviva) izoligo de geedzoj.
Sindikato : grupiĝo por defendo de komunaj ekonomiaj interesoj.

Sindiko : persono rajtigita zorgi pri la aferoj de korporacio, kies membro ĝi estas ; persono, elektita de komerca tribunalo, por administri bankrotintan entreprenon ĝis fina aranĝo de la afero.
Sinekuro : ofico kun salajro, sed sen devoj.
Skrutinio : kontrolo de per voĉdoniloj decidita elekto aŭ voĉdono.
Solicitoro : en kelkaj landoj (ekz., Britujo) speco de notario, profesia leĝisto, kiu pritraktas la leĝajn aferojn de privatuloj, firmoj, asocioj, k.t.p. Noto : en Britujo ekzistas publikaj notarioj, kiuj ne nepre estas solicitoroj, kaj inverse, kvankam unu persono povas kunigi la du funkciojn.
Solventa : pagokapabla, pagopova.
Spekul(aci)i : negoci, esperante profiton nur el hazardaj okazoj.
Statuto : fundamenta regularo de societo.
Subvencio : mona helpo, precipe tiu de ŝtato al publika institucio.
Tantiemo : gajnoparto.
Tarifo : tabelo de pagoj impostaj, fervojaj, k.c.
Testamento : skribaĵo per kiu iu persono deklaras siajn lastajn volojn kaj ordonas pri asigno de la postlasota heredaĵo.
Transito : transira komerco de varoj tra iu lando, sen pago de lokaj lim-impostoj.
Trato : speco de kambio, per kiu iu persono, nomata tratanto, devigas alian personon, nomatan tratato, pagi je difinita tempo, ian monsumon laŭ ordono de tria persono.
Tribunalo : juĝistaro, juĝejo.
Tributo : dependeca pago.
Trusto : grandega sindikato de fabrikistoj, akaparanta ĉiujn produktaĵojn de iu industrio, por altigi aŭ reguligi la prezojn.
Ultimato : ne-ŝanĝebla decido, definitivaj kondiĉoj de interkonsento, kies malakcepto signifas rompon de la intertraktado.
Uzuro : procentego.
Valida : prezentanta la laŭleĝajn kondiĉojn postulatajn por regule efiki.
Valuto : monvaloro ; monunuoj en iu lando.
Verdikto : decido de juĝantaro pri akuzito.